# *Denuncas Kubo malkunlaboremon de Usono*



Havano, 10 jan (RHK) La direktoro por Usono de la ministerio pri eksteraj rilatoj de Kubo, Carlos Fernández de Cossío,  ree denuncis la ne kunlaboremon de Va?ingtono por eltrovi respondon al la nomataj incidentoj pri sano de siaj diplomatoj en Havano.

Per sia mesa?o en la socia reto Twitter, la funkciulo insistis pri tio ke la usona registaro ne montris ajnan pruvon pri la incidentoj, tamen, kelkaj parolistoj kaj amaskomunikiloj de la norda lando uzas la terminon “atakoj” por priskribi ilin.

La fakto estas ke ?is nun Usono ne povis pruvi la okazadon de incidento nek klarigi pri la raportoj de sanproblemoj de siaj diplomatoj. ?is nun ili rifuzas je kunlaboro rilate eltrovadon de respondoj.

Li aldonis ke en Usono mem oni ne kredas je tiaj akuzoj, scenejo demonstrita per la vizito de preska? 640 mil usonanoj al Kubo en 2018, spite al la kampanjoj kontra? Kubo kaj la fortigo de la sie?o komerca, ekonomia kaj komerca altrudata al la insulo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/180578-denuncas-kubo-malkunlaboremon-de-usono

# Radio Habana Cuba